

E Ŭ R O P A B U L T E N O

Sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo

n-ro 12

10-an de marto 2001

Redaktas:

Umberto Broccatelli -

Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio

Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio

u.broccatelli@iscalinet.it

u.broccatelli@libero.it

tel./fakso +39-0687135019

Kasisto de EEU:

Hans ten Hagen, ten.hagen.esperanto@mxs.nl

UEA-konto de EEU: **eece-p**

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri *Eŭropa Esperanto-Unio* (**EEU-informilo**) kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (**Eŭropa debato**).

Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso *u.broccatelli@iscalinet.it*; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento

Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo”
Hamilton, The Federalist

Oni povas ricevi la Bultenon en papera formo fariĝante “simpatianto de EEU”, per sendo de kontribuo de almenaŭ 20 eŭroj jare al la UEA-konto **eece-p**
TTT-ejo de EEU: <http://lingvo.org/eo.html>

E E U - I N F O R M I L O

STARTAS LA BRUSELA KOMUNIKAD-CENTRO ALVOKO AL ĈIUJ EŬROPAJ ESPERANTISTOJ KAJ AL LA LANDAJ ASOCIOJ

Lingva tutmondiĝo konsistigas gravan minacon al lingvaj diverseco kaj egaleco. Uzado de naciaj lingvoj en rolo de lingvoj internaciaj pli kaj pli evidentigas malekvilibrantajn efikojn en la plej diversaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj kampoj. Ĉiuj tavoloj de la nuna tutmonda socio spertas la efikojn de lingva malegaleco.

Vole-nevole, esperantistoj estas pioniroj sur vojo al la lingva demokratio. Pro la neŭtraleco de Esperanto, ties parolantoj kaj organizoj kapablas pritrakti lingvajn problemojn sen antaŭjuĝoj. Danke al sia tutmonda komunumo, esperantistoj pli klare sentas la malekvilibrantajn soci-ekonomiajn kaj kulturajn sekvojn okaze de altrudo de naciaj lingvoj por internacia uzado. Praktikante neŭtralan solvon, esperantistoj estas pli atentaj al lingvaj malegalecoj kaj samtempe evitas naciismajn reagojn al dominantaj lingvoj.

La lingva problemo estas aparte grava en Eŭropa Unio, kiu en la venontaj jaroj pliigos la nombron de siaj membro-landoj kaj sekve la nombron de siaj lingvoj.

La tendenco estas al la uzado de kelkaj laborlingvoj kun preferata rolo kompare kun la aliaj.

ESTAS NEPRE NECESE KAJ URĜE ANTAŬENIGI EN EŬROPO LA KOMPRENON PRI LA ROLO, KIUN ESPERANTO POVUS LUDI POR FACILIGI KOMUNIKADON INTER LA EŬROPAJ LAŬ MANIERO DEMOKRATA KAJ SENPRIVILEGIA.

TIAL UEA KAJ EEU ALVENIS AL INTERKONSENTO PRI STARIGO EN BRUSELO DE KOMUNIKADCENTRO, KIU DISVOLVU INFORMADON PRI TIU TEMARO AL LA EŬROPAJ INSTANCOJ KAJ AL LA MULTAJ PLURNACIAJ ĴURNALISTOJ LABORANTAJ EN BRUSELO

Por funkciigi tian centron provizora buĝeto antaŭvidas bezonon de 36 000 eŭroj por 2002.

La nunaj disponeblaj monrimedoj atingas nur 17 000 eŭrojn, do estas defcito de 19 000 eŭroj. UEA konsentas garanti la kovron de tiu defcito, sed EEU klopodos malpliigi ĝin kolektante kontribuojn de landaj asocioj kaj de unuopuloj.

Do ĉiuj landaj asocioj en Eŭropo estas alvokataj kiel eble plej multe altigi sian kontribuon al EEU. Tiu kontribuo nun estas nur 0,25 eŭroj por ĉiu asociano.

La Nederlanda E-Asocio kreskigis sian kontribuon al 1 eŭro por ĉiu asociano.

La Itala E-Asocio donis aldonan kontribuon egalan al sia ordinara kontribuo por la jaro 2001.

Ĉiuj unuopaj esperantistoj komprenantaj la gravecon de la esperanto-agado je eŭropa nivelo estas alvokataj malavare doni sian kontribuon, sendante ĝin al la konto de EEU ĉe UEA: eece-p.

ĜENERALAJ CELOJ DE INFORMCENTRO EN BRUSELO

Starigi daŭran komunikadcentron, kiu, pere de agado pri kaj por lingva egaleco kaj diverseco ĉe internaciaj kaj naciaj organizoj, politikistoj kaj ĵurnalistoj, plibonigos kaj la publikan bildon de Esperanto kaj lingvan konscion. La Brusela komunikadcentro sekvos kaj analizos lingvopolitikajn decidojn tutmonde agante laŭeble kun aliaj naciaj kaj internaciaj esperantaj organizoj.

Centra en la laboro de la komunikadcentro estos peresperanta agado por lingva egaleco kaj diverseco tutmonde celanta pli konkretan bildon de la lingvo Esperanto kaj ties movadaj celoj. La centro ankaŭ detale informos Esperantistojn pri sia laboro, kontribuante ankaŭ al la profesiiĝo ĉe la informada kampo de naciaj kaj internaciaj esperantaj asocioj.

La celaro de la centro plilarĝiĝos kaj pli bone difiniĝos dum la disvolviĝo de la afero, laŭ la kvanto de la homaj kaj financaj rimedoj, kiujn oni sukcesos kunmeti.

La brusela centro detale informos Esperantistojn pri sia laboro. Laŭeble komunikadspertoj kaj kontaktoj de la centro ankaŭ estos transdonataj al naciaj kaj internaciaj Esperanto-asocioj, kontribuante tiele ankaŭ al profesiiĝo en la informada kampo. La centro celas konkrete kaj daŭre kontribui al la tri agaddirektoj de la Strategia Laborplano 2001-2010 de UEA, nome profesiiĝo, tutmondiĝo kaj plijuniĝo. Kontribuante al tiuj tri agaddirektoj, la centro celas:

- 1) renovigi esperantan ttt-ejon (www.esperanto.org aŭ www.esperanto.net)
- 2) kunlabori kun interesataj landaj asocioj por starigi regulan kaj altnivelan gazetaran komunikadservon,
- 3) sekvi la uzadon de la vorto "Esperanto" en tutmondaj amaskomunikiloj proponante eblajn plibonigojn.

STRUKTURO DE LA BRUSELA INFORMCENTRO

Estas fondata Komisiono pri Brusela Komunikadcentro (KBK), kiu konsistos el reprezentantoj de la jenaj asocioj: EEU (3 reprezentantoj), Institucio Hodler (1), BEF (1), UEA(3), la Ĝenerala Direktoro de UEA pro ofico kaj la Kasisto de EEU pro ofico.

La tri reprezentantoj de EEU en la komisiono estos: Grégoire Maertens, Claude Longue-Epée kaj David Ferguson, kun la tasko de ĝenerala sekretario de EEU. La ceteraj membroj estos baldaŭ nomumataj.

NE PROKRASTU!

DONU VIAN BRIKON

AL LA KONSTRUADO DE NIA ESPERANTO-DOMO

EN EŬROPO!

***Sendu kontribuojn per ĝiro al la UEA-konto de EEU eece-p
samtempe informante la kasiston de EEU:***

***S-ro Hans ten HAGEN, Middenweg 587,
NL-1704 BH HEERHUGOWAARD, Nederlando***

ten.hagen.esperanto@vxs.nl

ESPERANTO EN LA EŬROPA PARLAMENTO

Esperanto ĝenas moŝtulojn. Kaj kvankam nia internacia lingvo ankaŭ suferas de malbona publika bildo ĉe eŭropaj moŝtuloj en Bruselo, Esperanto ne malaperas el parlamentaj mensoj. En septembro la svedino Cecilia Malmström faris oficialan demandon al la Komisiono por ekscii kial Eŭropa Unio financis neniun Esperanto-projekton dum Eŭropa Jaro de Lingvoj. En januaro 2000, la angla socialisto Richard Corbett volis scii, ĉu Eŭropa Komisiono esploras la eblecojn de Esperanto por la tradukservoj de Eŭropa Unio kun pli ol 20 oficialaj lingvoj. Laŭ Corbett, Esperanto povus esti solvo ĉar nia internacia lingvo estas neŭtrala, regula kaj rapide lernebla. Ankaŭ tiu demando de Corbett ĝenis Eŭropan Komisionon. Pro tio, brita ano de Eŭropa Komisiono Neil Kinnock flankenŝovis la demandon al nebula "komitato" por tielnomata "pritraktado". Intertempe, Kinnock puŝas alian solvon de la lingva problemo ĉe Eŭropa Komisiono: enkonduki la anglan kiel nuran laborlingvon.

Strange la demando pri uzado de Esperanto per eŭropaj tradukservoj ne perdiĝis dum "pritraktado" fare de la "komitato". Kaj dum Eŭropa Jaro de Lingvoj, ĝuste tiu homo taskita de Eŭropa Komisiono por "pritrakti" la rolon de Esperanto preskaŭ lasis fali ĉampan-glason pro ŝoko. La homo, ĉefo de la Komisiona tradukservo, ŝokiĝis ĉe eleganta eŭropa evento vidante anon de Brusela Laborgrupo pri la Lingva Problemo. La Brusela Laborgrupo pri la Lingva Problemo proponas al la tradukservo de Eŭropa Komisiono la uzadon de tielnomataj "planlingvoj" - inter kiuj Esperanto. Nun la Komisiono ankoraŭfoje devos "serioze" pritrakti la uzadon de Esperanto per la eŭropaj tradukservoj pro nova parlamenta demando, farita la 14an januaro 2002. Maurizio Turco, itala membro de Internacia Radikala Partio en Eŭropa Parlamento, estas suspektema pri la "komitato" kiu devas "pritrakti" la uzadon de Esperanto. Ĉu ĝi vere ekzistas? Kiu membras en ĝi? Jen la oficiala demando al Eŭropa Komisiono:

Parlamentaj demandoj - *SKRIBA DEMANDO E-0075/02 de Maurizio Turco (NI) al la Komisiono (14an de januaro 2002)*

Temo: Laborgrupo de SCIC (Komuna servo de interpretado kaj konferencoj) pri utiligo de la internacia lingvo nomata Esperanto.

La Eŭropa Komisiono, pere de la Vicprezidanto Neil Kinnock, petis al SCIC (Komuna servo de interpretado kaj konferencoj) ke ĝi ekvivigu laborgrupon por esplori la projektojn koncernantajn la lernadon de esperanto kaj taksu la mezuron laŭ kiu ĝi povus esti utiligata kiel pontlingvo por interpretado.

Konsidere al tio ĉi, ĉu la Komisiono povas respondi la jenajn demandojn?

- En kiu dato estis formaligita tiu peto al SCIC? ĉu la laborgrupo estis aktivigita? jeskaze, kiam? kiuj estas ĝiaj membroj kaj kiuj estas iliaj kvalifikoj? laŭ kiuj kriterioj ili estis elektitaj?

- Ĉu la grupo jam kunsidis? jeskaze, en kiu dato? ĉu ekzistas protokoloj kaj/aŭ surbendigoj pri tiuj kunsidoj kaj, jeskaze, ĉu ili estas publikaj? kiun bibliografion kaj kiujn studaĵojn la grupo eventuale konsideris (ekzemple ĉu la studaĵon de la itala Ministerio pri Klerigado de la jaro 1995)?

- Al kiuj konkludoj eventuale alvenis la laborgrupo? kaze ke ĝi ankoraŭ alvenis al neniun konkludo, kiam kaj tra kiu itinero ĝi antaŭvidas alveni?

D.F.

EŬROPA DEBATO

El la itala taggazeto "La Stampa" de la 9a de januaro 2002, ni ĉerpas la jenan artikolon, kiun ni taksas interesa por niaj legantoj.

POST LA ALVENO DE LA UNUNURA EŬROPA MONUNUO KAJ LA POLEMIKOJ PRI LA RUGGIERO-AFERO: KIO MANKAS AL LA POLITIKA KONSTRUADO? LA EŬROPA UNIO KAJ ĜIAJ MALAMIKOJ.

Kial estas tiel malfacile kompletigi la eŭropan konstruaĵon? Malmultaj estas la veraj nodoj, malmultaj kaj simplaj la reformoj povantaj malligi ilin. Tamen la celpunkto ŝajnas fora kaj ĝi povus esti maltrafota. Kial? Pro almenaŭ kvar tipoj de kialoj: ĉar la entrepreno ne havas precedentojn, ĉar ĝi havas kontraŭulojn malkaŝajn kaj kaŝajn, ĉar estas malpliigiĝanta la puŝo de la ekonomiaj interesoj, ĉar malfortiĝis la ideala flamo.

La entrepreno ne havas precedentojn. Neniam antaŭ nun oni atingis la unuiĝon de malsamaj ŝtatoj dividitaj de jarcentoj da historio - kaj kia historio! - uzante nek la rimedojn de la dinastia heredado nek militon, sed la pacan forton de la konsento. Neniu el la federacioj de ŝtatoj hodiaŭ ekzistantaj povas taŭgi kiel modelo, ĉar la celo de tiuj, kiuj volas Eŭropon, ne estas elterigi la radikojn de niaj diversecoj kreante superŝtaton kiu anstataŭu la naciajn realaĵojn, sed male gardi ilin, tamen transigante al la eŭropa nivelo funkciojn kaj decidojn kiuj transpaŝas la nacian dimension.

La kontraŭuloj de la Unio ekzistas. Iuj ŝtatoj, kiel Britio, havas malantaŭ si historion, kiu bone klarigas ilian malemon pluri sur la vojo de la politika unuiĝo forlasante la simbolojn de suvereneco, kiu, kvankam ĝi estas jam pli ŝajna ol reala, estas sentata kiel nerezignebla. Sed la veraj kontraŭuloj estas aliloke, ili estas interne de iuj ŝtatoj fondintoj de la Unio, kiel Francio, kiuj tamen, kiam ili en la pasinteco volis antaŭeniri sur la vojo de la integriĝo, tion ili faris, ne lasante sin haltigi fare de aliuloj. Se estas vere ke niaj naciaj ŝtatoj jam havas nenan voĉon en la elektoj de la monda politiko, tamen por granda parto de naciaj politikaj klasoj la ŝajno pli valoras ol la substanco, la transdono de la bildo de sidanto ĉe la tablo de la granduloj politike repagas (aŭ almenaŭ tiel oni opinias) pri la fakto ke la veraj decidoj estas farataj ĉirkaŭ aliaj tabloj, kun pli malgrandaj dimensioj kaj kun pli malgranda nombro da seĝoj.

Estas do komprenebla la emo de multaj naciaj gvidantoj prokrasti, dilui la vere efikajn instituciajn proponojn, la solajn kapablajn transformi aron da senpovaj subjektoj en veran kaj kompaktan unuiĝon de ŝtatoj. Tamen la ŝlosilo kiu malfermas la pordon al la estonteco estas la ŝlosilo de la instituciaj reformoj. La puŝo de la ekonomiaj interesoj, decidan por la sukceson de la unueca merkato, ne agas same efike tie, kie bezonatas reformo de la komunaj institucioj, ĝi eĉ riskas estigi premon kontraŭdirektan: ĉar malfortaj eŭropaj institucioj povus ne malplaĉi al multaj entreprenoj.

Ankaŭ la idea flamo, el kiu elŝprucis la unio, estas febliĝanta. La memoro pri la du civilaj militoj eŭropaj estas jam preskaŭ malaperinta, pro natura estingiĝo de tiuj, kiuj travivis ilin. La timo al la sovetia imperiismo dissolviĝis. La atingo de ekonomia bonfarto, trankvila bonfarto ŝirmita kontraŭ mondaj respondecoj - kiujn Usono male sentas kaj al kiuj respondas: en la bono kaj en la malbono - obtuzigas en Eŭropo multajn konsciencojn.

Malmultaj perceptas la nestabilecon de la monda aranĝo kaj la urĝantan ritmon de la historio, kiuj povus igi nerealigebla la kompletigon de la eŭropa konstruaĵo: kiel jam okazis en la pasinteco ĉe aliaj projektoj de unuiĝo poste subirintaj, ekde Grekio de la civitoj ĝis Italio de Renesanco. Kaj la eŭropan idealon - kiu tamen estas tre alta kosmopolita idealo - oni ne vivas kun la sama intenseco kiel iujn politikajn idealojn de la pasinteco: la nacia unuiĝo aŭ la strebo liberigi sin el fremda subpremado atingis realiĝon ĉar en ilia nomo unuopuloj, sociaj grupoj, foje tutaj popoloj montris sin pretaj je forofero de sia vivo.

Ĉu la ŝipo estas do baldaŭ grundonta? La risko estas reala, sed la vojo ne estas barita. La kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj fortoj favoraj al progresado de EU ekzistas. Kerno el eŭropaj institucioj kun federacia eco ekzistas. Ekzistas komunaj interesoj kaj realaj solidarecoj, kies konkreta simbolo la ununura monunuo estas. Ekzistas la defioj de terorismo kaj de plivastiĝo al la landoj de Centra Eŭropo.

Ekzistas la ebleco ke la estontaj internaj kaj internaciaj krizoj ankoraŭfoje ludos favore al la Unio, se iuj eŭropaj gvidantoj kapablos esti longvidaj same kiel aliaj estis tiaj en la lasta jarkvindeko. Kaj ekzistas la iniciato, decidita en Laeken, pri la eŭropa Konvencio, reprezenta organo potencie kapabla alpreni konstituci-faran rolon kaj proponi - eble eĉ trudi - efikan modelon de eŭropa konstitucio. Kiel ĉiam, la estonta historio lasas malfermitaj almenaŭ du vojojn.

Antonio Padoa Schioppa

(La aŭtoro estas la itala Estrarano de la Eŭropa Centra Banko)